

## UEA-interveno kaj abunda informado de Stefano Keller pri Esperanto ĉe UN en Ĝenevo

*Stefano Keller*, ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo aktive ĉeestis la 9-an sesion de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP, 11-15 julio 2016). La ĉefaj temoj de la sesio estis: la Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj, rajtoj de handikapitaj indiĝenoj, rajto je sano, rajtoj de indiĝenoj rilate al entreprenoj, la UN-Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Keller intervenis pri la tagorda punkto 7: *La celoj de la daŭripova evoluo kaj la rajtoj de indiĝenaj popoloj*.

Li atentigis pri la signifo de la konoj de indiĝenaj popoloj pri naturo, konservado de la biodiverseco, kiuj estas pluportataj per iliaj lingvoj. Li substrekis, ke la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj.

Li citis partojn el la Deklaracio de la 64a Konferenco de Ne-Registaraj Organizajhoj, organizita de UN en Bonn, Germanio (2011), pretige al la konferenco «Rio+20» (1). Tiam, Keller sukcesigis kun sia teamo akceptigi en pluraj frazoj de la Deklaracio ĉiujn proponojn de UEA pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto, eĉ du kompletajn alineojn, el kiuj li citis ĉi tiun:

*«Ni alvokas pri la respekto kaj inkludo de la etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj entenas informojn pri la komplekseco de la naturĉirkaŭaĵo, kaj alvokas pri la konsidero de la ebleco utiligi neŭtralan internacian lingvon, facile lerneblan.»*

Sekve li fokusigis la atenton al la fakto, ke en tiu ĉi sesio de EMRIP (kaj en aliaj eventoj de la Palaco de Nacioj) la kunsidaj dokumentoj estas disponigataj plej ofte nur angle, neglektante la aliajn 5 oficialajn lingvojn de UN. Li subtenis la intervenojn de aliaj reprezentantoj, kiuj parolis pri la graveco de gepatralingva edukado kaj pri la malrespekto de lingvaj rajtoj de indiĝenoj.

En tiu momento li informis pri la **Esperanto-Tago, tago de lingva justeco**, festota la 26-an de julio. Konklude li proponis al la partoprenantoj de la kunsido, sperti tian tutmondan kunvenon de popoloj, en kiu la komunikado okazas en justa kaj lingve egalrajteca maniero, kun reciproka kultura riĉiĝo, diskutante en **Esperanto** pri "*Socia justeco - lingva justeco*". Li invitis la ĉeestantojn al la 101-a UK de Esperanto, okazonta en Nitro (23-30 julio 2016).

Al la reprezentantoj de Slovakio jam komence de la kunsidsemaĵo li transdonis slovaklingvajn informilojn pri Esperanto-Tago kaj pri la 101-a UK. (2)

Post la interveno de la reprezentantino de Kanado, li dankis kaj gratulis ŝin pro ŝia dulingva alparolo, parte franca kaj parte angla, oficialaj lingvoj de Kanado. La reprezentanton de Ĉilio li aliris por peti ties interventekston menciante la mankon de kunsid-dokumentoj en ĉiu alia oficiala lingvo de UN krom la angla.

Krom sia interveno Keller rekontaktis malnovajn konatojn el antaŭaj UN-kunsidoj, kreis novajn kontaktojn, diskutis pri kunlaborebloj.

Dum la tutsemaĵa sesio Keller zorgis pri abunda informado pri UEA, Esperanto, Esperanto-Tago (Lingva justeco) kaj pri la 101-a UK, per diverslingvaj informiloj kaj interparoladoj kun ĉeestantoj.

---

*Pliaj informoj (diverslingvaj versioj de la alparolteksto, sonregistraĵoj, video):*

<http://www.linguistic-rights.org/eventoj/#EMRIP9>

- Gazetara Komuniko de UEA: <http://uea.org/gk/622a1>

- Referencoj: (1) <http://www.linguistic-rights.org/rio/#UNDPINGOBonn>

(2) <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2016.html#ET2016SK>

kaj <http://goo.gl/9RzpSS> (PDF-informilo slovakaj)

---

Tiu ĉi informilo:

pdf <http://goo.gl/J8NoZp> docx <http://goo.gl/OchxSx> doc <http://goo.gl/DW6Ajb> rtf <http://goo.gl/F21uIS> foto <http://goo.gl/BnipeD>